**Luminesk‘ - la silvestra rekontiĝo de Germana Esperanto-Asocio**
**27-a de decembro 2023 ĝis 2-a de januaro 2024**
**Insulo Norderney**

## Dua informilo

La tagoj fariĝas pli mallongaj, kaj venis la tempo decidi pri partopreno en nia silvestra / novjara renkontiĝo Luminesk’, ĉijare sur la orientfrisa insulo Norderney.

## Kiel veni al tiu insulo?




Norderney estas atingebla per regulaj pramŝipoj de la kompanio Norden-Frisia (www.inselfaehre.de), kiuj ekveturas de Norddeich Mole, norde de Emden. La ŝipveturado daŭras proksimume unu horon. Sed atentu : la lasta ŝipo vespere forlasas la havenon de Norddeich Mole je la 18 :15h. Ĝis la ŝipo veturas trajnoj. La lasta trajno kun konekso al la pramŝipo alvenas je la 18 :04h (IC 2200 el Köln/Kolonjo ĉefstacio, ekveturo de tie je 13 :43h). Se vi planas veni trajne, aĉetu bileton ĝis Norderney inkluzive la ŝipvojaĝon. Eblas ankaŭ veni aŭtomobile kaj lasi sian veturilon sur parkejo en Norddeich Mole (prezo : ek de 6 € po tago). Kaj eblas kunpreni la aŭton sur la insulon (kostoj por la ŝiptransporto tien kaj reen proksimume 80-100 € por normala aŭtomobilo). Uzo de aŭtomobiloj sur Norderney estas limigita, sed ekzistas tie parkejoj kiun similaj tarifoj kiel en Norddeich. En ĉiu kazo aŭtomobilistoj planu alveni en Norddeich Mole minimume duonan horon antaŭ forveturo de la ŝipo. Ĉar la tagoj ĉirkaŭ kristnasko kaj novjaro estas ĉefa sezono, transporton de aŭtomobilo nepre necesas rezervi sufiĉe frue.

## Apartaĵoj de kuracloko ĉe la maro

La vetero evidente ne estas antaŭvidebla : normale sur la insuloj ĝi ofte ŝanĝiĝas. Preparu vin do por vintra vetero kun - kelkfoje forta - vento kaj pluvo, sed povos ankaŭ esti bela sunbrilo. La renkontiĝo okazos en komforta domo (« Caritas Inseloase », Marienstr. 16, kaj la apuda « Friesenhof ») proksime al la urbocentro. De la kunvenejo facile eblas piede atingi ĉion gravan, krome ekzistas buslinioj. Norderney estas kuracloko kaj disponigas al siaj gastoj la respektivan infrastrukturon. Por tio la urbo postulas lokan imposton, la « gastan kontribuon » (« Gästebeitrag »). Ĝi en Norderney estas ligita al la bileto por la pramŝipo : la bileto samtempe funkcias kiel « NorderneyCard »). Vi ricevos ĝin antaŭ albordiĝo aŭ sur la ŝipo. Bone konservu tiun karton kaj donu ĝin al ni post alveno : ni tiam zorgos pri pago de la gasta kontribuo kaj redonos la karton al vi. Iom nekutima sistemo, sed funkcias.






Fotoj : © Ulrich Brandenburg, 2023

## Programo

Validas la ĝenerala programskemo, kiun ni jam dissendis kun la unua informilo. Ĉar ni kunvenos sur insulo, ni ne organizos la kutiman tuttagan ekskurson al fora loko, sed plurajn ekskursojn kaj vizitojn en Norderney mem : rondveturadon kun klarigoj pri historio kaj geografio, viziton de informcentro pri la nacia parko Vadomaro (Wattenmeer ; agnoskita de UNESKO kiel monda natura heredaĵo), viziton de muzeo pri la historio de la banloko (Norderney agnoskiĝis kiel banloko jam en 1797), viziton de la loka observatorio, kaj gustumadon de orientfrisa teo kun la necesaj klarigoj. Al la programo

kontribuos Ankie kaj Nanne (konataj kiel KAJTO) per muziko kaj rakontoj pri ilia hejmregiono en okcidenta Frislando. Amri Wandel prelegos pri astronomia temo kaj denove organizos Internacian Vintran Universitaton. Christof Roether - kiu pasintjare enkondukis nin en la fenomenon de tajdoj - prezentos alian astronomian specialaĵon. Franz Kruse enkondukos en la platdiĉan lingvon, kiu iom konserviĝis sur la insulo. Guido Brandenburg parolos pri fervoja temo el la regiono, Ulrich Brandenburg pri la Transsiberia Fervojo, Daniel Mühlemann pri trafikcirkloj - kaj pluraj aliaj partoprenantoj jam proponis programerojn. Vi eĉ povos pasigi specialan orientfrisan abiturientan ekzamenon. Kiel en la pasintaj jaroj Kristin Tytgat denove gvidos paroligan kurson. Ni ankaŭ denove prezentos la lokon de la venonta Universala Kongreso (kvankam neniu el ni jam estis en Aruŝo). Post la vesperaj programeroj kiel kutime denove eblos kunveni en « gufujo » kun diversaj trinkaĵoj.

**Aliĝu baldaŭ, se vi ne jam faris**

Aliĝu prefere rete (www.esperanto.de/luminesk-aligho), sed eblas ankaŭ sendi aliĝilon al Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. La aktuala partoprenkotizo por loĝado kaj manĝoj de la 27.12. ĝis la 02.01., programo kaj silvestra bufedo estas 620 € (loko en dulita ĉambro) kaj 770 € (unulita ĉambro). Kiel indikite la organizantoj ankaŭ transprenos la kostojn por la loka « gasta kontribuo ». Nemembroj de GEA loĝantaj en Germanio krompagos 30 €. Aliĝo validas post ricevo de antaŭpago (minimume 50 €). Pagu al la konto de Germana Esperanto-Asocio, IBAN : DE53 5085 1952 0040 1158 42 ĉe Sparkasse Odenwaldkreis, BIC : HELADEF1ERB aŭ per UEA-konto geaa-n. Kaj ne forgesu ĝiri la restsumon ĝustatempe antaŭ la komenco de la aranĝo. Post la 31-a de oktobro la kotizo altiĝos al 650 respektive 800 €. Sed ni tre rekomendas aliĝi baldaŭ : post la 1-a de novembro GEA devos redoni ne bezonatajn ĉambrojn por eviti financan perdon, kaj tial ne plu povos garantii al vi lokon.

**Ĝis revido sur Norderney !**

Ni tre ĝojas revidi vin kaj ĝui kun vi la kutiman, familiecan kaj trankvilan Luminesk'-etoson, ĉifoje en nekutima loko.

*La organiza teamo : Andreas Diemel, Barbara kaj Ulrich Brandenburg*